

Notoj de la ĉefredaktoro

La longjara, tre meritoplena redaktoro de SCIENCA REVUO, prof. *Božidar Popović*, fininte ĉiujn laborojn super la 28-a volumo, transdonis al mi la stafeton. Ĉi-okaze apartenas al li sincera danko pro la senlimaj oferemo kaj entreprenemo, kun kiuj li vivtenadis la revuon, plenumante samtempe funkciojn de la prezidanto, redaktoro, administranto k.m.a. La historio de ISAE neniam forgesos lian bravan kontribuon al aplikado de Esperanto en la sfero scienca-teĥnika.

Aliflanke mi devas konstati, ke — el vidpunktoj perspektivaj — ŝajnas al mi neeviteble, dividi la ĝisnunajn taskojn de prof. *Popović* inter plurajn membrojn aŭ eĉ instituciojn de ISAE. Pri konkretajoj decidis la jarkunveno en Varno.

Kiom temos pri la redaktado mem, mi konservas en miaj manoj sole la funkcion ĉefredaktoran, por ke estu garantiata kohera koncepto de la revuo. Tiun ĉi unuan kajeron (natursciencan) redaktis mi mem, sed la ceteraj estos komisiitaj al pluraj kompetentuloj, ekz. la 2-a n-ro (teĥnika kajero) al *Ing. Jan Werner* (Ĉeĥoslovakio).

Aŭtoroj, intencantaj kontribui al SCIENCA REVUO per siaj artikoloj, bonvolu respekti jenajn punktojn:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ilin facile komprenu eĉ alifakaj sciencistoj.
2. Sendi la tajpitan tekston en 2 ekz. (prefere sur maldika papero).
3. Tajpi en la spegulo 160 mm x 250 mm, kun liniado 1½, t.e. 40 linioj surpaĝe.
4. Ĉiun neesperantan vorton substreki ondlinie (kursiva preso), dum rektlinia substreko signifas preson dika. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj.
5. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

Anticipe mi ĝojas pri fruktodona kunlaboro

J. Kavka

Perspektivoj por sistemigo de la magmorokajoj

Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)*

1. Enkonduko

Jenaj konsideroj prezentas esencon de prelego, plenumita ĉeĥlingve (25.1.1977) por Katedro de Petrologio ĉe Natursciencia Fakultato de Karola Universitato en Prago. Ili provas skizi pri tendencoj koncerne la magmorokajan sistematikon. Por la petrologoj, kies profesio postulas diagnozadon kaj klasadon de la magmoproduktoj, la problemaro estas nepre aktuala. Oni bonvenigus universalan klasadsistemon, kiu estus normiga por la ĉiutaga praktiko kaj premisa por la tutmonde komparaj studoj. Aliflanke restas fakto, ke la ĝisnunaj sistemoj tro facile misfunkciis eĉ en la plej banalaj okazoj.

Ĉi eseo celas — krom alio — konduki al tio, ke iuj tradiciaj konceptoj submetiĝu al objektiva kritiko kaj ke iniciatiĝu serĉado de novaj vojoj.

Scienco pri la magmaĵoj, same kiel petrologio de la sedimentoj kaj metamorfajoj, trapasis dum la cent jaroj mirindan evoluon al ekzakteco. Kontribuis al ĝi la pli-malpli teĥnika orientiĝo. Pro la fakto, ke petrologio konsiderinde transpaŝis la kadron de geologiaj disciplinoj, interveninte en multajn branĉojn de la teĥniko (minekspluatado kun ercpurigado kaj metalurgio), konstruado kun ceramiko kaj vitrofarado, industria ĥemio, terkulturo inklude forst-flegadon, hidroteĥniko kun balneologio, energetiko, astronautiko k.t.p.), ĝi sukcesis — iom post iom — malkovri vicon da surprizaj korelacioj en la petrofizika, petroĥemia, mineralogia, struktura kaj teĥnologa ĥarakterizado de la rokaĵoj. Gravan influon al interpretado de grandega amaso da datoj havas kaj ĉiam pli multe havos la tre impeta disvolviĝo de la teĥnika matematiko. Pri tio ankoraŭ pli poste.

2. Genez-aspektoj en la rokaĵ-klasado

Sed eĉ en la tradicia sfero de la geologiaj sciencoj, la situacio radikale ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj. Mapado, intense plenumata sur vastaj teritorioj en la kaj evoluinta, kaj evoluanta partoj de la mondo, serĉa ĝis detala esploradoj cele mineralokuseja aŭ inĝenieria geologio, ĉio ĉi kontribuas al ĉiam pli klara formulado de genez-rilatoj en la magmorokaj korpoj. La unua jarcent-duono

* doktoro de la natursciencoj, kandidato de la teĥnikaj sciencoj, ĉefo de specialgeologia esplorcetro ĉe GEOINDUSTRIA, nacia entrepreno en Prago.